# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

*5, Quai Vauban* - 66-**PERPIGNAN** (P.-O.) - *Telefono 34-38-84*

Jara Abono : 3 F. – C. C. P. 956-28 Montpellier

N° 40 . . . . 000 . . . 000 . . . . 4$^a$ Kvaronjaro I971

## N I M E S : MALIONGA RECENZO pri la UNIVERSALA KONGRESO en LONDONO . . .

Lastsomere,kun Gesinjoroj FRUS , mi partoprenis la jaran tutmondan kongreson en la brita ĉefurbego.-

Nia veturilo kondukis nin ĝis Bulonjo post halto en Parizo.-El la memorebla urbo de la I$^a$ kongreso,ŝipo "car-ferry" deponis nin sur la kvajo de Dovero,kaj la vagonaro,sur tiu de la plencentra stacidomo Charing Cross,kie ni alvenis dimanĉo Ia de aùgusto,vespere.- Ni havis tuj la ŝateblan hazardon sonori la bonan pordon : hotelo kies mastro estis franca.-Tiu servema samlandano multe helpis nin por nia adaptado en tiu stranga medio,ĉar ŝajnis al ni ke Britio estis vere sen komparado kun la aliaj ŝtatoj kie ni jam vojaĝis.-

Sed,rapide,ni kutimiĝis pri la ĉi-tieaj vivaĵoj : brekfesto, subtera vagonaro,altaùbusoj,puboj,snakoj,ktp...Plie,ni konstatis - eĉ se tio malplaĉus al nia franckultura registo-, ke la itala lingvo estis la okcidenta lingvo la plej uzata (ekster la angla, kompreneble..) .- Multe da restoracioj estas ankaù italaj,kaj la turistoj kiuj ne ŝatas la lokajn nutraĵojn povas korekte manĝi - kaj trinki - en ili .-

Ke la legontoj indulgigu nin se,kelkfoje, ni preferis viziti la ĉefurbon ol ĉeesti la debatojn de la kongreso : sed ni esploris ĉion kion oni devas vidi : la Iondona Turo , kun la subtera fortika ĉambro kie oni montras la mirindajn juvelojn de la reĝino kaj de la imperio,la milita mezepoka muzeo, la fama Tura Ponto,Vestminstra Palaco kun "Big Ben",B'kingema Palaco kun ĝia ĉiuTAGa kvarda ŝanĝado kiu altiras unu miliono da kuriozuloj,kaj,Trafalgar-Placo apud kiu ni dormis,nia vera punkto por sin retrovi .- Tiel, ni profunde rigardi la tieajn kolombojn,sed,ankaù, la tielnomitajn "bitnikojn" aù "Hipiojn" .- Ni promenadis sur la Tamizaj bordoj,kaj sur la ĉefaj bulvardoj :Oksford strato,Ĉarig kaj Totenham Strategoj,esploris la noktan mondon de Pikadila Cirko,marŝis sur la belaj verdaj grasoj de Regent' k. Hed'Park' Ĝardenoj.-

Fine,ni aùdis ke la kutima diro pri la ĉiama pluvo estis mensogo...Tial, ni estis tre feliĉaj kiam ni ekvidis ĝin kaj rivevis ĝin sur la kapo kaj la ŝultroj....

Nun, oni povus paroli pri la kongreso.....

. . . . / . . . .

La kongresloko estis "The University College" kies la esperanta traduko estas senutila .- Sed, kontraŭe la francaj universitatoj kiuj estas fermitaj dum la libertempoj, tie-ĉi, estis studentoj kaj profesoroj pri biologio aŭ aliaj sciencaĵoj, kaj la kongresantoj estis miksitaj kun la ne-esperantistoj .- Kelkfoje, la ĉambrego kie oni debatis ne estis libera, kaj en tiu ampleksa domego, ne estis facila por eltrovi la anstataŭan parolejoj .- Ofte, la ĉambrego estis tro malgranda por akcepti la aŭdantaron, kaj multaj ne povis eniri kaj vagis tra la korodoroj, ŝtuparoj, ripozejoj, aŭ dormetis .-

La ĉefa organizanto de la kongreso, S-ro WELLS estas profesoro en tiu universitato, kaj oni komprenas sian elekton .-Ne estus vera se ni skribis ke tiu organizado ne estas rimarkinda : la akceptintoj estis tre afablaj kaj oni antaŭvidis ĉion kion oni postulas en kutima manifestacio .- Ne povinta tagmanĝi en la ĉambro rezervita por enskribitaj kongresantoj, ni manĝis, finfine, kun la studentoj, kaj laŭ tre konvenebla kaj malmultkosta maniero .-

Se ni mankis la solenan malfermadon kiu okazis 36 horoj antaŭ nia alveno en Londono, se ni ne havis la eblecon eniri en la paroladejo kie okazis la unua plena laborkonsido, ni sukcesis partopreni la duan kiu stariĝis ensufiĉa ĉambro de la movado "Kvakeroj", sur la Justona Stratego .- Tiu kunveno estis tre interesa, ĉar oni debatis pri la ĉefa temo de la kongreso : Por aŭ Kontraŭ la angla - kaj la franca- lingvo kiel internacia lingvo .-

Oni neniam laciĝas aŭskulti S-ron LAPENNA disvolvi tuin problemon, ĉar li povas gliti meze siaj argumentoj, la fruktojn de sia homa eksperimento .- La parolado estis tradukita anglalingve.-Reciproke, S-ro Mac MILLAN kiu ne estas samideano klarigis kial sia nacia lingvo estis la komprenilon inter popoloj, pro ke la plej studata kaj uzata tra la mondo .- Por ni, tiu argumento ne konvinkis nin ĉar niaj konoj de la lingvo de Ŝekspiro servis por nenio dum nia restado en Britio .-Kaj ni revenis, persvaditaj ke nia instruado de la lingvo de Albiono estas senutila, se la lernantoj ne vivas almenaŭ dum unu jaro en tiu lando, prefere, antaŭ la studado de la skribado, eĉ kun la kvazaŭa prononcado per specialaj signoj .- Tio estus malpli kosta ol sep jaroj da studo laŭ 5 horoj posemajne (prefera horaro en klasoj por kvarjaruloj) .-

Niaj samfederacianoj legos abundajn detalojn sur la nacia k. internacia gazetoj pri tiu lingvisma kunveno .-Rilate al argumentoj de la franca debatinto, ni konfesos ke ni aŭdis ilin, ĉar lia parolado finiĝis kiam ni atingis la kunvenejon .-

Pri la fakaj aferoj, mi recenzas la duan labortagon de la Instruadistaro.-Pli da cent kongresistoj ĉeestis, kaj, ankaŭ tie, la ĉambro estis tro malgranda...kaj treege varma.-S-ro DAZZINI (Italio) raportis pri la situacio de la kursoj en ĉiu lando, akcentante tiujn kie la oficialaj instancoj permesas la instruadon en lernejoj, ĉar nia verŝajna celo estas, finfine, tiu enkonduko permesita de la registaroj .-

La libro-servo stariĝis en aparta loko kiu similis, iomete, al gimnastikejo aŭ remizo...Estis la [illegible] kunvenejo de tiu kongreso, la nura kie oni povis renkonti la amikojn sen longtempaj esploradoj

La organizado estis bonega kaj oni povis rapide aĉeti broŝurojn, librojn, poŝtkartojn, fotojn, k.t.p.-Oni povis enskribi al estonta universala kongreso en Portland kaj al aliaj diversaj kunigaĵoj.-Sur tabelo, oni legis tion kion presis la britaj gazetoj, kaj, bedaŭrinde, ni devas konfesi ke la semajnajn okazintaĵoj pli multe interesis la ĵurnalistoj : luna esplorado de Apollo, puno por tri perantoj de la koruptema gazeto "OZ", ktp.- En alia granda urbo ol Londono, eble nia grava kongreso pliege estus bruiginta .- H. JANNEZ

ANKORAU PRI LA 56a UNIVERSALA KONGRESO

La ĉijara Universala Kongreso estis malfermita en Londono de la Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio la lan de augusto en la impona grandega reĝa Festivala Halo.

Okaze la solena inauguro brile kondukita de prof. Lapenna, salutis dum la festparolado en Esperanto ĉu en nacia lingvo, la reprezentantoj oficialaj de 12 ŝtatoj, pli poste sekvis la salutoj de la reprezentantoj de la Esperanto-movado el diversaj landoj, aliĝinta al U.E.A. Ne estas eble raporti ĉi tie pri ĉiuj gravaj eroj de la kongresa programo. Estu do menciataj nur la gravaj publikaj diskutoj pri temoj koncernantaj la Esperanto-movadon. La 2an de augusto vicprezidanto Carlén gvidis debaton pri Neutraleco de UEA - ĉu la nuna laustatuta koncepto estas adekvata ? ; post pluraj intervenoj, per granda plimulto decidis, ke la nuna difino estas fakte adekvata. La 4an de augusto vicprezidanto Wensing gvidis debaton pri La problemo de lingva komunikado en la nuntempa mondo ; fakto eksterordinara en niaj kongresoj, ĝi estis dulingva kunsido, kun uzo ankau dela angla lingvo kaj samtempa traduko, por ebligi ankau al neesperantistoj esprimi sian opinion, kaj fakte oficiala reprezentanto de British Council, la instituto por disvastigo de angla lingvo, prezentis siajn argumentojn, al kiuj efike respondis prof. Lapenna kaj d-ro Sadler.

La Komitato de U.E.A. elektis la novan estraron. Gi konsistas el prof. Lapenna (prezidanto), Wensing kaj Carlén (vic-prezidantoj), Becker (ĝenerala sekretario). Bormann, Uspienski, Wells kaj Woessink.

Meritas mencii ke firmo FIAT disdonis al ĉiuj kongresanoj belan tekon kum orkolora surskribo kaj kum prospektoj pri siaj produktoj, kaj projekciigis filmon en Esperanto Renkonto kum FIAT.
En la Ferma Kunsido estis aprobita la jena.

KONGRESA REZOLUCIO

La 56a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Londono dela 31a de julio ĝis la 7a de augusto 1971a en la ĉeesto de 2100 reprezentantoj el 40 landoj,

notas kum kontento la grandan interesiĝon, kium elvokis ĉe la publiko de la kongresa lando kaj internacie la ĉeftemo de la Kongreso "La Problemo de Lingva Komunikado en la Moderna Mondo" pritraktita em formo de forumo en la ĝenerala kunveno de la Kongreso de la 4a de augusto;


esprimas sian dankon al la raportintoj, al "British Council", "Goe the Institut" kaj aliaj institucioj au organizaĵoj pro iliaj kontribuoj kaj atento ;

Konstatas, ke la prezentitaj raportoj, aldonaj raportoj kaj kontribuoj ankoraufoje evidentigis la eksterordinaran gravecon de la problemo de interkomunikado per lingvo en internaciaj rilatoj en mondaj kadroj ; ke tiu problemo postulas urĝan solvon, por kiu, por la konfliktantaj interesoj de la naciaj lingvoj, la neutrala Internacia Lingvo prezentiĝas kiel la plej racia solvo ;

Komisias la estraron de Universala Esperanto-Asocio Komuniki tium ĉi rezolucion al Unuiĝintaj Nacioj, al U.N.E.S.CO., al la reprezentitaj institucioj kaj aliaj interesitaj internaciaj kaj naciaj instancoj.

decidis sendi peton al ses landoj membroj de C.E.E. Kaj Landoj kandidataj al unuiĝon en la komuna Merkato. "Konstatante dum lastaj negociecojestis malfermita la lingva problemo, kaj kiel solvon oni pripensis uzi nura lingvo. Sed tiel solvon oni devigas pensi ke baldaŭ okazos malfacilaĵoj ĉar unu lingvon estas sufiĉe diskriminacia kontraŭ alian tiamuaniere mur per Esperanton oni povas eviti tiel malfacilaĵoj".

Roberto Frus



**Grava afero!**

**Ne mortigu la policuloj!**

**Por niaj viglaj Automobilistoj...**

**ne forgesu post la Universala Kongreso, de Londono, reveni al nia normala dekstra direkcio sur la vojoj.**

Unu semajno en Gresillon

Nia amiko P. BABIN, prezidanto de la Esperantista Kulturdomo, atendas nin ĉe la stacidomo en Baugé. Kvinminuta auto-veturado, kaj ni eniras la kastelon ĵus vekiĝinta Rapida refreŝiga tualeto ! Baldaù sonorado alvokas al matenmanĝo. Manpremoj ! matenaj salutoj ! Ni plezure retrovas malnovajn gekonatojn - Japanio, Hispanio, Germanio, Jugoslavio Belgio, Portugalio, Italio kaj Francio estas tie reprezentataj. Ciam la sama frateca etoso kium ni konis antaù des jaroj. Kiu unu Fojon venis en Grésillon nepre revenas.

Post la foriro de Gejoĵ BABIN al la Londona kon greso, Ges. M. GUILLOT gvidis tium "Internacian periodon. La programo konsistis el prelegoj kaj ekskursoj.

Jean Thierry, estrarano de U.E.A., demonstris al ni, per trafaj ĉitaĵoj ke "Esperanto estas drameca lingvo.

Zadravec (jugoslavio) parolis pri "La lingvaj problemoj" en sia lando.

Mitivier prezentis "Kelkajn aspektojn de la kamparana vivo en Anĵou.

Hugo Röllinger (Germanio) prelegis kunlumbildoj pri "la arto en la prahistoria epoko".

Maroko
kaj sia hejmurbo Bad-Kissingen, Famkonata kuracloko

Krom tiuj laborhoroj, ekskurso tra la luara valo, kaj vizito al la nekomparebla spektaklo en Le Lude estis organizitaj.

Sed restis ankoraù sufiĉe da tempo por ripozi, promeni, viziti la ĉarman urbeton Baugé, ludi, legi, babili, eĉ fiŝkapli kaj sin bani surloke.

En Grésillon, la vivo estas tiel agrabla ke tro rapide forkuras la tempo kaj ĉiam kun bedaùro oni forlasas ĝin.

ĝis la revido .... GRESILLON !

A. K. R. RAYNAUD

ALES

---

Vizito de Sro TYBLEWSKI

La 17an K 18an de Junio ni akceptis nian polan samideanon Deko da gregrupanoj partoprenis komunan manĝon en restoracio.

Jaùdon vespere Sro TYBLEWSKI prelegis pri la estiĝo de internacia lingvo kaj montris diapozivojn pri sia hejmregiono. Tridek Tridek personoj ĉeestis. ĉe la Fino de la Kunveno Kelkaj faris demandojn al nia amiko pri la vivo en Pollando.

Jaŭdon matene akompananante lin al la bambua arbaro, Siro VILLEMIN havis aŭtomobilan akcidento la veturilo tute difektiĝis sed bonŝance la okupantoj tute ne suferis.

Pri La Vizito de S-ro Tyburcjusz TYBLEWSKI
en la ĉefurbo de Rusiljono :

La Kultura Esperanto-Centro de Perpignan akceptis, de la 9-a ĝis la 11-a de junio 1971, S-ron TYBLEWSKI, pola esperantisto, profesoro pri pedagogio ĉe la instruista seminario de Jelenia Gora.

S-ron TYBLEWSKI preparas doktoran tezon pri "La Internacia Turismo" kium li baldaŭ prezentos ĉe la Universitato de Varsovio, kaj pro tio, li intervjuis delegitinon de la Turisma Oficejo de nia urbo havigi la necesajn klarigojn kiujn li bezonas tiucele. Komprenebla, unu el niaj semideaninoj akompanis lin por traduki la demandojn kaj la respondojn !

Nia pola amiko partoprenis la vivon de nia regiono ĉeestante la katalunan kurson kiun gvidas S-ro LLECH-WALTER ; li eĉ lernis danci "La sardane". Li ankaŭ ĉeestis koncerton kium oferdonis, ĉe la urba teatro, folklora grupo "Les Cantaires Catalans" (La Katalunaj Kantistoj), kaj prezidis la premio-disdonadon al niaj junaj gelernantoj kiuj ĵus finis la esperantan lernojaron.

Ni vizitigis al S-ron TYBLEWSKI "Le Perthus" kie li povis vidi la landlimon inter Hispanujo kaj Francujo ; "Canet-Plage", strando la plej proksima de Perpignan ; kaj ankaŭ nian famkonatan ekspozicejon pri ceramiko kaj tapetar "Sant-Vicens" kie li povis admiri tapetojn de Jean Lurçat.

M. V.

BEZIERS

---

Senbrue sed regule la grupo de BEZIERS daŭrigis la laboron dum la lastaj monatoj. Pluraj kursoj okaris, kaj 4 gelernantoj gainis stipendion kiu ili ebligis partopreni al diversaj kongresoj (ĉu S.A.T. Amikare en Yvetot ĉu S A T en Orsay). Neniu povis vojaĝi al Londono okaze la U.E.A. Kongreso.

Finfine ses grupanoj ĉeestis la kongreso en Orsay.

Kiel multaj aliaj grupoj de la regiono, la grupo akeceptis polan samideanon kiu, krome prezentis diapzitivojn en la liceo por junulinoj. Pluraj estis tre interesitaj de Esperanto. Ni Klopodos organizi kurson malgraŭ multaj malfacilaĵoj.

## DEPARTAMENTA FEDERACIO HERAULT

Nova jaro komenciĝas, ni volus plivigligi la agadon de la federacio, daŭrigi la propagandon por la kampadejo de Balaruc, la instruadon de Esperanto, eĉ plilarĝigi la intersanĝojn kun eksterlandanoj. Pro tio kompreneble la Federacio bezonas monon ! Done forgesu pagi vian kotizon plej eble baldaŭ

1) Izolaloj 4 F. sendu rekte al
   Fédération départementale de l'Hérault
   3 Ave de la Gaillarde - MONTPELLIER
   C.C.P. - MONTPELLIER 1689-89

2) Grupanoj de Montpellier kaj Beziers vi ne bezonas sendi monon al la Féderacio sed nepre pagu vian kotizon al via grupo ; la federacia kotizo estas enkalkulata en la grupa kotizo sed - NE MALFRUIGU - ni petas.

En la jaro 1970-71 ni reklamis pri Balaruc en pluraj esperantaj gazetoj, tamen sen grada sukceeso, ĉar la afero ne estas ankoraŭ sufiĉe organizita.

Stipendoj estis disdonitaj. Ni volus plivastigi nian agadon. Pro tio ni ŝatus, ke la kursgvidantoj de Herault kontaktiĝas kun la Federacio (3, avenue de la Gaillarde, MONTPELLIER) tuj kiam la kursoj komenciĝos. Ni zorgos por plifaciligi ilian laboron.

Ili devas instigi la lernantoj multe labori por sukcesi la "Atesto pri elementa lernado" Tiuj, kiuj sucesos ricevos premion (Libron kaj abonon al esperanta gazeto) tiuj, kiuj ne sukeesos sed kiuj, tamen, regule vizitos la kurson kaj laboros ricevos abonon. Tiamaniere ni opinias, ke la kursoj pli bone disvolviĝos.

N. B. ĉiu mona donaco estos bonvena - Dankon.

<u>MONTPELLIER</u>

Centre Culturel Esperanto
5, Rue Docteur Roux

Kunvenoj : ĉiujn unuajn lundojn ĉe - Foyer d'Accueil du Mas de Tesse
1574 Rue des Sorbes
(proksime de l'avenuo de Lodeve)

En la komenco de la jaro 1971, dana paro alvenis en Montpellier por studi la fracan lingvon, li partoprenis kaj eĉ gvidis niajn kunvenojn. En junio dum pluraj tagoj vizitis nin sinjoro TYBLESKI el Pollando, okaze la junia kunveno li montris diapozitivojn pri la polaj montaroj.

Nuntempe, ĵus alvenis en nia urbo du studentoj el kanado, ili studas sciencojn, kaj ni esperas keili vizitados niaj kunvenoj.

La dimanĉon 24-an de oktobro, je la 10-a matene, okazos en la kulturdomo de Narbonne komitatan kunvenon de nia Federacio kun la sekvanta tagordo :

- Morala Raporto (Prezidanto),
- Financa Raporto (kasisto),
- Kultura Semajno en Grésillon,
- dato kaj loko de la 1972-a Federacia Kongreso,
- diversaj demandoj.

Mi esperas ke la komitatanoj povos ĝin ĉeesti, kaj tutamike salutas vin.

La Prezidanto,

René LLECH-WALTER.

---

Ronéotipé pour la Fédération d'Esperanto Langedoc-Roussillon

Directeur de la publication : Roberto FRUS
Ecole Maternelle
Edouard Vaillant II - Z.U.P.

30 - NIMES

# NOTU BONE !

Al niaj afablaj jurnalistoj kunlaboraj, mi satus ricevi viaj artikolojn dum la unua semajno de decembro. – Sendu la leterojn al nova adreso supre presita.

La direktoro.

